# *Pli ol 200 intelektuloj kaj akademianoj rezidantaj en Kubo kaj aliaj landoj rifuzas komunikon de LASA*




Havano, jun 8 (RHK) Pli ol 200 akademianoj kaj intelektuloj lo?antaj en Kubo kaj en aliaj landoj de la hemisfero, inkluzive de Usono kaj Kanado, subtenis la malferman leteron senditan al la Sekretariejo de la Latin-Amerika Studasocio (LASA, por ?iaj akronimoj en la angla) fronte al ties deklaro, kiu pridubis la protekton de homaj rajtoj en la antila nacio.

Komence subskribita de Aurelio Alonso, Miguel Barnet, Rafael Hernández, Nancy Morejón, Pedro Pablo Rodríguez kaj Ambrosio Fornet, presti?aj intelektuloj, distingitaj per la Premio  de la Kuba sekcio de la akademia organizo, la letero atentigas pri «la unuflanka sinteno” kaj la “stranga kaj instrua tono'' de dokumento, en kiu, kvankam ?i beda?ras la blokadon kaj sankciojn truditajn de Usono en sia provo

renversi la registaron de suverena nacio, ?i montras zorgon pri "la traktado, kiun  ricevas akademianoj kaj akademianinoj, intelektuloj kaj artistoj en Kubo ».

La subskribintoj asertas, ke "Kubo ne estu mezurata per alia stango ol la aliaj latinamerikaj landoj, nek Usono mem", kaj ili atentigas ke malakcepti duoblajn normojn kaj  anta?kondi?ojn estis premisoj por la intelektuloj kaj artistoj implikitaj en la fruktodonaj inter?an?oj, kiujn ili havis dum kvar jardekoj ene de LASA.

Samtempe ili fidas, ke "nur per la kontinueco de ?i tiu dialogo kaj la apliko de la konceptoj, kiuj regas en LASA kiel institucio, ni povos konservi kunlaboron, kiu anka? estis ekzemplo de demokratio kaj reciproka respekto, samkiel   kontribui al la protekto de niaj liberecoj kaj homrajtaj praktikoj en la kampo de edukado kaj kulturo, ?i tie kaj tie".

La deklaro de la Sekretariejo LASA anka? estis kritikita de la Argentina ?apitro de la Reto de Intelektuloj, Artistoj kaj Sociaj Movadoj por Defendi la Homaron, kiu rimarkis la koincidon de ?ia elsendo kun la kampanjo, kiu celas distordi la realon kaj misfamigi la kubajn instituciojn.

fonto: Granma

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/259986-pli-ol-200-intelektuloj-kaj-akademianoj-rezidantaj-en-kubo-kaj-aliaj-landoj-rifuzas-komunikon-de-lasa](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/259986-pli-ol-200-intelektuloj-kaj-akademianoj-rezidantaj-en-kubo-kaj-aliaj-landoj-rifuzas-komunikon-de-lasa)

**Radio Habana Cuba**